

Enhavo

1	Stilfiguroj II (<i>Till Dahlenburg</i>).....	1
2	Ni reale ekzistu! (<i>Claude Gacond, Nancy Fontannaz</i>).....	3
3	Forpasis <i>Mauro La Torre</i> (1946-2010).....	5
	Persona bibliografio – elekto	6
4	<i>Tazio Carlevaro</i> – okaze de lia 65-jariĝo.....	7
	Persona bibliografio – elekto	8
5	Aktoj de la esperantologia konferenco 2009.....	20
6	Priplanlingvaj publikaĵoj de <i>María Luisa Calero Vaquera</i>	20

*

1 Stilfiguroj II

Till Dahlenburg

(Pri la preparoj al dua eldono de „*Pli lume la mallumo zumas – Stilfiguroj en la poezio de Esperanto*”. Novjorko 2006, Mondial)

La recenzoj pri mia kompilaĵo de stilfiguroj en la esperantlingva poezio (specife tiuj de Baldur Ragnarsson / „esperanto”, aprilo 2007, p. 86/87/ kaj de Sabine Fiedler / „Literatura Foiro”, februaro 2008, p. 49/50/) instigis min, prilabori kaj pliampleksigi la libron. Estis necese, forigi la multajn preserarojn kaj korekti certajn malĝustaĵojn. La Indekso III, en kiu estas traktataj etimologiaj paraleloj inter la fakterminoj kaj la ĝenerala Esperanto-leksiko, nun enhavas pli da informoj, kaj la kvanto de la priskribitaj tropoj resp. figuroj kreskis de 149 al 174. Mi prezentu kelkajn el ili (aldonante ilian proksimuman signifon surbaze de „Lexikon der Sprachkunst“ [Leksikono pri la lingva arto] de J. Dominik Harjung, München 2009):

ANANTAPODOTO	Ellaso de tuta pensformulaĵo enkadre de unu frazo.
DERIVACIO	Uzado de samradikaj vortoj ene de unu frazo.
EKVIVOKO	Erar(ig)a konkludo sekve de homonimoj.
KOHABITACIO	La sama vorto kun iomete alia signifo.
MEANDRO	Ripeto de vorto el antaŭirinta verslinio aŭ eldiro.

METASTAZO	1. Forigo de propra kulpo; 2. Uzo de la historia prezenco anstataŭ de la rakontanta preterito.
PARADIASTOLO	Apliko de la konjunkcioj <i>aŭ</i> resp. <i>nek...nek</i> cele al plireliefigo de la eldiro.
SINATROISMO	Akumuligo de vortoj kun simila signifo.

Mia ĉefa celo konsistas en tio, ilustru la enlistigitajn fakvortojn per ekzemploj el beletraj verkoj, en la dua eldono ne nur el la poezio, sed ankaŭ el la prozo. Plialtiĝis la nombro de la cititaj aŭtoroj (en la unua eldono ĉ. 130, aktuale pli ol 200), kio eble pravas pri la riĉeco de la esprimovo de Esperanto-beletraĵoj, ĉu originale kreitaj, ĉu tradukitaj. La nova periodaĵo, ekde la jaro 2007, la „Beletra Almanako” (Novjorko, Mondial, respondeca eldonisto: Ulrich Becker) prezentas novan tre riĉan fonton.

Bedaŭrinde, por kelkaj fakvortoj mi ankoraŭ ne trovis taŭgajn ilustraĵojn el la beletro; tiuj estas: AKROTELEŬTO, BATOSO, DUBITACIO, KOMUNIKACIO, KONCEDO, KONTAMINO, METABOLO, METONOMAZIO, POLIPTOTO, PRETERICIO, TELESTIKO. Sed mi pensas, ke unu el ili, la akroteleŭto, ne bezonas ekzistopravon, ĉar ĝi prefere taŭgas nur por ludemuloj (la akroteleŭto, en la plej simpla aranĝo, estas difinita kiel versaĵo, kies komencaj literoj de la unuopaj versaj linioj kaj kies finaj literoj de la unuopaj versaj linioj, legitaj desupre suben kaj desube supren, formas la saman vorton).

Multaj originalaj esperantlingvaj verkoj atestas ŝajne facilan aplikon de la planlingvo inkluzive de diversaj stilfiguraj nuancigoj, tamen, la plej konvinkan pruvon pri aplik-elasteco de la planlingvo liveras tradukoj el etnaj lingvoj, kompreneble fare de talentaj majstroj de la tradukarto. Permesu al mi, konfirmi miajn impresojn per du eltranĉaĵoj.

- Dialogoj ofte ĉerpas sian vivecon el certa plursenceco de difinita vorto, kio povas rezulti el duobla interpretado de la konsistigaj eroj de la vorto; la koncerna stilfiguro nomiĝas **AMBIGUECO: Aŭto-mato** (Stefan MacGill)

PANJO: Do, elvenu. Ĉio estas en ordo. Momenta ekscitiĝo. Ludu ŝakon plue.

KORA: Cetere, Tomi, tiu peco nomiĝas ne ĉevalo; la ĝusta nomo estas kavaliro.

TOM: Kavaliro kaj ĉevalo. Tiuj memorigas min pri nia lasta fiaskinta ekskurso!

KORA: Ho, jes, perdita en tiu arbaro kun la aŭto kaptita en la koto.

TOM: Ni devis serĉi ŝirmon for de la pluvo – kaj ni trovis tiun kavernon.

KORA: Do, kial tiu ŝakpeco memorigas vin pri tio?

TOM: Tio estis la kav-aliro.

KORA: Tom, vi estas sentaŭga ŝerculo. Kaj ĉevalo?

TOM: Nu, mi memoras montojn apude, certe ni estis ĉe valo.

(Beletra Almanako [2008], n-ro 2: 130)

- Similonaĵoj, t.n. paronimoj, estas aparte ekspluatindaj por spici dialogon, por ekzemple aludi la klerecnivelon de iu persono. Pri tradukado de tiu figuro, nomita ANOMINACIO, oni devas trovi formale kaj enhave adekvatan solvon por redoni la intencon de la primara aŭtoro. En la sekva „konversacio” inter Erkuno kaj la povra bubeto Simplicius la paronimecaj germanaj vortoj *Kirchen*, *Kirschen*, *Kriechen* (= preĝejoj, ĉerizoj, prunetoj) estas anstataŭigitaj.

- kun adapto de la kunteksto – per *prediko*, *perdriko*, *pedikoj* :

El „Simplicius Simplicissimus”

(Hans Jakob Christoffel v. Grimmelshausen; Trad.: Helmut Rössler)

Erkuno: Ĉu vi neniam aŭskultis predikon?

Simplicius: Jes, mi bone povas ĉasi kaj kaptis jam ofte perdrikon.

Erkuno: Mi ne parolas pri perdrikoj, sed pri predikoj.

Simplicius: Haha, pedikoj, ĉu ne estas bestetoj sur la kapo, ĉu ne?

(Brodt [1985; Red.]: Germana Antologio. Göttingen; Bleicher, p. 302)

Ne en ĉiu kazo oni klare kaj sendube povas decidi, pri kiu stilfiguro temas, ekzistas transiroj inter kelkaj difinoj, kaj subjektivaj impresoj de legantoj/aŭskultantoj ja ne estas maloftaj. Eĉ hazarda „naskiĝo“ de stilfiguro antaŭ la okuloj de la leganto okazas, kiel montriĝas – laŭ mia opinio – en la tria strofo de la versaĵo *Sukumbo* de Nikolai Lozgaĉev:

*Nubo post nubo
grego enua
ŝancelo kaj dubo
pluvero unua*

(Lozgaĉev, Nikolai: ‘Sur tranĉando de ponard’. Literatura suplemento de La Ondo de Esperanto por 1998. Jekaterinburg, p. 11)

Kunmetu la komencajn literojn de la duaj vortoj el la unuopaj linioj – vi ricevos *peku!* Ĉu la poeto alcelis tiun figuron, la MEZOSTIKON? Mi dubas, ĉar ĉiu de la kvin strofoj jam estas ornamita per impona figuro, nome per PARFORMULO (*ĵulo post ĵulo; blovo post blovo; nubo post nuboj; guto post guto, ombro post ombro*). Sed – laŭ la en la versaĵo skizata animstato de la verkinto ankaŭ konscia mezostikigo estus imagebla.

Fine mi petas vin, bonvolema leganto, informi min elektronike aŭ perpoŝte, se vi dum legado de Esperanto-beletraĵoj hazarde trovos ekskluzive interesan stilfigureskan formulaĵon. Mi ĝojus, se mi sukcesus, ankaŭ per via helpo, ekipi ĉiujn de mi prezentotajn fakvortojn de la lingva arto per konvenaj poeziaj resp. prozaj ilustraĵoj.

(Dr. Till Dahlenburg

Feldstraße 13, DE-19412 Brühl/Meckl.

Till.Dahlenburg@t-online.de)

2 Ni reale ekzistu! Kreo de Esperanto-Amikaro de CDELI

Claude Gacond kaj Nancy Fontannaz

Kvankam la tekstoj ne plu estas tute aktuala, tamen pro ĝia graveco ni publikigas ĝin, esperante, ke la anoncitaj aktivaĵoj plensukcese okazis kaj sin anoncis sufiĉe da subtenantoj. Se ankoraŭ mankas amikoj de CDELI la ĉi-sekva artikolo estu komprenata kiel alvoko.

Red.

2.1 Nuna¹ situacio de CDELI

La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (= CDELI – en la franca *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*) estas fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi fariĝis institucio mondkonata kaj frekventata de universitataj esploristoj kaj de interesatoj el ĉiuj tendencoj planlingvistikaj, do ne nur de esperantistoj.

¹ Tio estis novembro 2008.

Atesto pri tiu famiĝo en la esperanta medio ekzemple troveblas en la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, kie CDELI estas listigita en la rubriko *Mallongigoj de institucioj*, kaj tio eĉ escepte en la franca lingvo mem (Vidu PIV, jaroj 2002 kaj 2005, paĝo 1261-a).

La aŭtoritatoj de La Chaux-de-Fonds kaj de la Biblioteko de la Urbo konscias pri tiu graveco. Tion ili videbligis per la situo de la salono de CDELI en prestiĝa loko centre de la biblioteko super la freska kunvenejo Charles Humbert. Aparta sonorilo ĉe la biblioteka enirejo faciligas la akcepton de vizitantoj kaj kunlaborantoj ekster la laborhoraro de la Biblioteko. La libroj, periodaĵoj kaj dokumentoj estas konservataj en koridora vico da movbretaroj. Por la organizo de kulturaj aranĝoj, kiam la kunvenejo de la biblioteko ne sufiĉas, tiam klasejoj kaj aŭlo de la najbara lernejo estas je dispono. Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj tiu favora situacio faciligas la organizon de kulturaj kaj studaj renkontoj klerigaj por la praktikantoj de esperanto.

2.2 Nuna problemo

Salajrita bibliotekisto zorgas pri la katalogado de la libraro de CDELI je la kondiĉo, ke tiun funkciulon helpu kompetentaj bonvoluloj. Dum la kvindekjara vivo de CDELI plurfoje okazis portempa interrompo de tiu aktiveco, kiam bibliotekisto emeritiĝis aŭ migris al alia institucio. Tiuj interrompoj pli malpli longaj ĉiam okazigis pozitivan reekzamenon de la bezonoj de CDELI.

La nuna ege kompetenta bibliotekistino de CDELI, *s-ino Martine Schneller*, estis bedaŭrinde emeritigita fine de 2007 pro atingo de sia 62-a jaraĝo. Fakte la kaŭzo de tiu tro frua emeritigo de funkciuloj atingintaj tiun aĝon rezultas de ŝpara politiko celanta reduktion de la ŝuldoj de la ŝtato Neuchâtel kaj de la komunumo La Chaux-de-Fonds. La bibliotekistino de CDELI do ne estas la sola suferanto de tiu peniga situacio. Kiel ŝi aliaj funkciuloj perdis sian deĵoron kaj estas nun devigataj pli malpli vane serĉi novan vivtenan laboron. El tio rezultas suferiga problemo ne nur por la eksigitaj mem, sed ankaŭ por la Biblioteko kaj CDELI.

Martine Schneller, kvankam devigata serĉi novan laboron vivtenigan, tamen ne forlasis sian apogon al CDELI. Sensalajre ŝi plue venadas helpe katalogi librojn po unu tagon semajne. Ŝia kuraĝo kaj sindonemo pozitive impresas la bibliotekan direkcion.

2.3 La esperantistoj atestu pri sia ekzisto

En diskutoj kun la aŭtoritatoj koncerne al la aktiveco kaj situacio de CDELI ni konstatis, ke ĉe la politikistoj ekzistas tendenco al dubo pri la ekzisto de la esperantista publiko, ĉar ĝis nun ne reale mezureblis ĝia apogo, krom per donaco de arkivaĵoj. Fakte sentiĝas la manko de **Asocio de la Amikoj de CDELI**, per kiu povu esprimiĝi **la apogo de la esperantistoj**.

Tial kun la helpo de la juristino Sonia Bétrix, regula helpanto de CDELI, laŭ la modelo de la *Association des Amis de la Bibliothèque*, ni kreis la dezirindan *Association des Amis du CDELI* kun faka Organo *Esperanto-Amikaro de CDELI*.

Vi ricevas la statuton de tiu asocio². Fakte jure nur validas la franca teksto. La esperanta versio celas diskonigi tiun fondon ekster la franclingva teritorio.

Pagilo de la poŝta konto 10-227495-0 Amis du CDELI, **Esperanto-Amikaro de CDELI**, 2300 La Chaux-de-Fonds, ebligas tuj fariĝi **Esperanto-Amiko de CDELI** per la sendo de jarkotizo de Fr. 30.- Esperantistoj ne loĝantaj en Svislando ankaŭ povas esprimi sian apogon per jarkotizo de po € 20.- aŭ po \$ 30.- por persono. Ni esperas, ke dum la fino de la jaro 2008 ara do personoj jam povos tiel proklami sian subtenon al la tiom utila aktiveco de CDELI.

² Vidu http://www.cdeli.org/Statuto_Amikoj_de_CDELI.html, http://www.cdeli.org/Statuts_Amis_du_CDELI.html

2.4 La retejo raportos

La nun kreata retejo www.cdeli.org registros la **Amikojn de CDELI** kun nura indiko de iliaj nomo kaj loĝloko, sen mencio de reta kaj poŝta adresoj, tio por eviti misuzon de tiuj informoj. Tiu listo pruvos la ekziston de la esperantista publiko kaj ties apogon al CDELI. En la nuna kriza situacio la rikoltitaj jar-kotizoj helpas al la salajrado de la bibliotekistino.

Eble kelkaj Amikoj deziras ne simple kontribui per jar-kotizo, sed eĉ ĉiumonate alporti regulan mon-helpon. Tio facile fareblas per pag-ordono al propra poŝta aŭ banka konto. Se tiel 24 personoj ekzemple donacos po fr 30.- monate, tio fakte ebligas salajri la bibliotekistinon po unu labortagon semajne. Tio estos granda atingo.

Kaj se pli ol 24 personoj tiel alportos sian helpon, eble ni eĉ povos garantii la normalan salajradon de nia bibliotekistino por la 2 kutimaj labortagoj en la semajno.

Se dank'al regulaj monataj kontribuoj de Amikoj de CDELI tiu miraklo realiĝos, tio konsciigos la politikistojn pri la realeco de la esperantista publiko kaj fortikigos la pozicion de CDELI en diskutoj kun la aŭtoritatoj.

Estas klare, ke nur fakajn aktivecojn temporabajn ni celas provi salajre garantii, kiel tiu de la bibliotekista funkcio aŭ de katalogisto de la periodaĵoj, kiam la biblioteko provizore paneas en la plenumo de tiu tasko. Ĉiujn aliajn aktivecojn malpli fakajn CDELI plue efektivigos dank'al la helpo de sindonemuloj, kiel tio okazis ĝis nun. La nelacigebla helplaboro de volontuloj konsistigas tre originalan forton, kiu estas pozitive konsiderata de la aŭtoritatoj kaj tre utila al CDELI mem.

2.5 Alvokoj kaj administraj informoj

Ni dankas al Svisa Esperanto-Societo, kiu favoris la dissendon de nia alvoko al la kutimaj ricevantoj de la bulteno *SES informap*.

Ankaŭ alvokoj estos dissendataj al aliaj publikoj, ekzemple per la franca lingvo informiĝos Chaux-de-Fonds-anoj kaj politikistoj de la kantono Neuchâtel, ktp.

Jen la kunlaborantoj, kiuj jam pretas administri la Asocion de la Amikoj de CDELI :

La kasistan funkcion plenumos s-ino Sonia Bétrix.

Deĵoros kiel kaskontrolantoj s-ro André Sandoz kaj s-ino Ginette Pellaton.

S-ino Nancy Fontannaz estos la sekretario kaj s-ro Claude Gacond la prezidanto.

La Asocia adreso estas : Amis du CDELI aŭ Esperanto-Amikaro de CDELI, Bibliothèque de la Ville, Case postale 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds.

La unua Ĝenerala Asembleo de la Asocio *Les Amis du CDELI* okazos franclingve la vendredon 15-an de majo 2009 kaj la unua Asembleo de la faka Organo Esperanto-Amikaro de CDELI okazos esperantlingve la sabaton 16-an de majo 2009. Ambaŭ renkontoj estos sekvataj de interesa kultura aranĝo. Do jam nun registru tiujn datojn en via agendo.

3 Forpasis Maŭro La Torre (1946-2010)

La 25an de marto 2010, malfruvespere, pro nekuracebla malsano mortis en roma malsanulejo *prof. d-ro Mauro La Torre*, eksa prezidanto de ILEI, akademiano, konata esperantologo kaj aktivulo en instruaj medioj. Li laboris kiel profesoro pri eksperimenta pedagogio kaj komputika didaktiko en la Universitato de Romo III (Università Roma Tre). Grava esplorkampo lia estis la malĉeesta instruado/lernado helpe de elektronikaj instrumentoj (aparte la Interreto). Li estis tre ŝatata kiel homo kaj sciencisto. Omaĝe al Mauro La Torre ni

publikigas elekton de interlingvistike kaj Esperanto-rilate gravaj publikaĵoj el lia persona bibliografio.

Persona bibliografio – elekto³

(1974) kun Giorgio Raimondo Cardona kaj Renato Corsetti: "Lingvistiko kaj politiko: sinteno de lingvistoj antaŭ lingvaj problemoj kaj ekzemploj de aplikado de socilingvistikaj konceptoj". *Lingvo kaj socio*, Münster: TEJO.

(1974) kun Renato Corsetti: *Ĉu vi parolas tendare?* Rotterdam: UEA.

(1980) kun Renato Corsetti, Nino Vessella: "Pliriĉiĝo de la morfemaro en la internacia planlingvo." En: István Szerdahelyi (Red.), *Miscellanea Interlinguistica*. Budapest: Tankönyvkiadó, p. 368-379.

(1982) kun Renato Corsetti: Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado. *Hungara Vivo*, Nr. 5, p. 174-179.

(1983) kun Renato Corsetti: Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado. *Paco* (Berlin, GDR-eldono), p. 25-30.

(1983) kun Renato Corsetti, Nino Vessella: "Wzrost ilości morfemów w międzynarodowym języku planowym". En: Tadeusz Ejsmont (Red.): *Międzynarodowa komunikacja językowa. Internacia lingva komunikado*. Łódź: Uniwersytet Łódzki, p. 236-246

(1984) kun Renato Corsetti, Nino Vessella: *Esperanto. Corso di base*. Pisa: Edistudio.

(1993) kun Renato Corsetti: Paderborn e dintorni: Possibili condizioni per un esperimento sul valore propedeutico della lingua internazionale Esperanto. *Rassegna italiana di linguistica applicata* XXV, Nr. 3, p. 115-136.

(1993) "Personigitaj malĉeaj instru-sistemoj". *Internacia Pedagogia Revuo*, Nr. 3.

(1993) "Provincialismo culturale". *Cadmo*, Nr. 3 (Napoli, Tecnodid).

(1993) "Per un'ecologia della lingua". *Cadmo*, Nr. 2 (Napoli, Tecnodid).

(1995) kun Renato Corsetti: Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l'esperanto. *Language Problems and Language Planning* 19, Nr. 1 (Spring), p. 26-46.

(1995): "Instruika eksperimento esp²". *Internacia Pedagogia Revuo*, 25, Nr. 2, p. 13-15

(1996): "L'Esperanto nei mezzi informatici e telematici". *L'esperanto* (Roma) 27, Nr. 4, p. 3-5.

(1997): "Vorteroj kaj vortaroj: komparo pri vortfarado en la itala kaj Esperanto". En: Renato Corsetti (Red.), *Italanto. La itala variaĵo de Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia* 7. Milano: COEDES, p. 24-28.

³ Mi dankas al Renato Corsetti pro la kompletigo de la listo. Oni ankaŭ rigardu: <http://lps2.uniroma3.it/lps/biblio-curr/bibliografie/la-torre-biblio.htm>

(1997) "Introduzione" al Katalin Smidéliusz. *Analisi comparativa del lessico italiano esperanto ed ungherese a fini didattici*, Milano: Coedep.

(1997) "Europa interculturale o subculturale". *Cadmo*, Nr. 13/14.

(1998): "Ĉu la instrufaka terminaro estas sufiĉe matura?" *Internacia Pedagogia Revuo* 28, Nr. 4, p. 5-9.

(1998) "Gvidlinioj por lerneja edukprojekto Interkulturo". *Internacia Pedagogia Revuo*, Nr. 3.

(1998): "Lokismo, fremdismo kaj demokrateco." En: Mark Fettes/ Suzanne Bolduc (Red.), *Al lingva deomkratio. Towards Linguistic Democracy. Proceedings of the Nitobe Symposium of International Organizationp. Prague, 20-23 July 1996*. Rotterdam: UEA, p.150-151.

(2000): "Proverbante,...oni lernas". *Internacia Pedagogia Revuo* 30, Nr. 4:1-14.

(2001): Kiaj edukmodeloj por la homidoj de la tria jarmilo? En: Michela Lipari (Red.): *Internacia Kongresa Universitato, Zagrebo 21-28 Julio 2001*. Rotterdam: UEA, p. 87-96.

(2001) kun Renato Corsetti: Ĉu klara strukturo estas instrua? En: Klaus Schubert (Red.), *Planned languages: From concept to reality*. Brussel: Hogeschool voor wetenschap en kunst (VLEKHO), p. 179-202.

(2006): "Ĉu komputilo helpas komprenon?" En: Amri Wandel (Red.), *Internacia Kongresa Universitato. 59a sesio. Florenco, Italujo, 29 julio – 5 aŭgusto 2006*, Rotterdam: UEA, p. 112-133.

(2007): „Trafosante bitokojn“. En: Bertilo Wennergren (Red.): *Esperantologio kaj la Interreto Aktoj de la 29-a Esperantologia Konferenco en la 91-a Universala Kongreso de Esperanto, Florenco 2006*. Rotterdam: UEA, p. 41-52

(2008): "Kiel savi lingvo-variecon per interlingva edukado?" En: José Antonio Vergara (Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 61a sesio. Roterdamo, Nederlando, 19-26 julio 2008*. Rotterdam: UEA, p. 82-95.

(2009): Nombrado: ilaro, vortaro, cifero. En: José Antonio Vergara (Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 62-a sesio. Bjalistoko, Pollando, 25 julio – 1 aŭgusto 2009*. Rotterdam: UEA, p. 121-135.

(2010): Kie fluas lakto kaj mielo. En: Detlev Blanke, Ulrich Lins (Red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA, p. 663-677.

4 Tazio Carlevaro – okaze de lia 65-jariĝo

D-ro Tazio Carlevaro naskiĝis la 27-an de julio 1945 en Bellinzona, itala Svisio. Dum jardekoj li apartenis al la plej aktivaj interlingvistoj kaj praktikantoj de diversaj planlingvoj. Li unue lernis Ido. Sekvis Esperanto, Occidental-Interlingue kaj Interlingua. Sed ankaŭ pri Volapuko kaj aliaj planlingvoj li havis profundajn konojn. Aparte gravaj estas liaj publikaĵoj pri ido kaj Interlingua (i.a. sub la pseŭdonimo Edo Bernasconi). Carlevaro estas rigardebla unu el la plej „kompletaj“ interlingvistoj, kiu dum la lastaj jardekoj bedaŭrinde preskaŭ komplete ĉesis aktivi. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de „Centre de documentation et

d'étude sur la langue internationale" (CDELI), la planlingva arkivo en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Dum unu jardeko (ĝis 2007) li ankaŭ estis membro de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL. Kadre de la 7-a konferenco de GIL (7.-9. 11. 1997 en Berlin) li prelegis en la germana lingvo kaj krome en Ido kaj Interlingua. Tazio Carlevaro laŭ profesio estas psikiatro kaj psikoterapiisto (ankaŭ vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Tazio_Carlevaro). Gratulon al la jubileulo!

La sekva listo estas parto el la ampleksa perosna bibliografio de Carlevaro. Ni elektis tiujn titolojn, kiuj iel rilatas al interlingvistiko, esperantologio, Esperanto-movado, lingvistiko, lingvo-politiko. Ankaŭ aperas alitemaj artikoloj, se ili estas verkitaj en Esperanto aŭ aliaj planlingvoj (post Esperanto aparte temas pri Ido kaj Interlingua).

Persona bibliografio - elekto

Mallongigoj/ Klarigoj

A	antologio, libro-kolekto
anno	jaro/ jarkolekto
El voster cögh	(pseŭdonimo de Carlevaro)
Edo Bernasconi	(pseŭdonimo de Carlevaro)
LiVe	Lingua Verde (revuo)
M	monografio
N-o, n-o,	numero
REC	recenzo
trad.	tradukita de...

1966

"Semi al vento". (Marcel Erbetta, trad. Tazio Carlevaro). En: La Scuola, 4/1966

1970

"Petro Stojan: Vivo kaj verko". En: Svisa Espero, 6, 7, 10.

1971

REC "Contro l'aggressione culturale". En: Svisa Espero, N-o 11.

"La talpoj en la Esperanta literaturo. Diskuto pri kelkaj estiĝo-kaŭzoj". En: Svisa Espero, N-o 6; represo en: Kontakto, 1972.

REC "Versioni poetiche in dialetto comasco dall'Esperanto" (G. Azzi). En: Svisa Espero, N-o 10.

"Verso il suicidio linguistico?". En: Le Penne, Milano (FEI).

"The Naturalist School in Interlinguistics". Braunschweig (Vieweg). represo en: Hauptenthal, 1976.

1972

"La talpoj en la Esperanta Literaturo. Diskuto pri kelkaj estiĝokaŭzoj". En: Kontakto, N-o 2, anno 9.

"Mimnermo". En: Svisa Espero, N-o 1

1973

"En Svislando kreiĝis internacia renkontiĝejo interlingvistika". En: Esperanto (UEA), N-o 7-8 (66-o anno).

"Planlingvoj, kaj koncernaj rilatoj kun socio- kaj psiko-lingvistiko". En: Monata Cirkulero, 47, 48, 49.

"Sociolingvistiko ed Interlingvistiko. Introdukto a Antologio dil Idolinguo". En: Antologio dil Idolinguo (Red. A. Juste, Gilly (aŭtoro)).

1974

"Interlingvistiko kaj planlingvistiko en la mondo". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 55 (marto).

"Kelkaj pripensoj koncernantaj la instruadon de Esperanto". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 60 (represo en: Internacia Pedagogia Revuo, 1975).

Esperanto en Perspektivo (kun Ivo Lapenna und Ulrich Lins). Rotterdam (Universala Esperanto-Asocio (verkis la ĉapitrojn: "La Esperanta Kulturo", "Literaturo", "Traduka Beletro", "Scienca Literaturo", "Fakaj Terminaroj", "Periodaĵoj", "Formoj de Kulturaj Aplikoj").

1975

"Esperanto-Movado en itallingvaj landoj". En: Internacia Pedagogia Revuo, n-o 3 (anno 5)

"Kelkaj pripensoj koncernantaj la instruadon de Esperanto". En: Internacia Pedagogia Revuo. N-o 1, anno 5 (ankauŭ en: Monata Cirkulero, 1974)

"Planlingvoj kaj junulara movado" En: Kontakto n-o 47

"Proposte per una collaborazione in campo interlinguistico". En: Cultura e Industria, Rimini.

"Svisa lingvopolitiko kaj politiko de Esperanto". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 64.

1976

REC "Ĉu vi kuiras ĉine?" (Claude Piron). En: Dialogo, anno 4, n-o 4

"Die naturalistische Schule in der Interlinguistik". En: Plansprachen (Red. R. Haupenthal). Darmstadt

"Eseo pri fakto-kongrua teorio de la kategorio 'gramatika genro' en Esperanto". En: Monata Cirkulero, 73

"I Giurassiani svizzeri: una minoranza in lotta". En: La Monda Lingvo-Problemo. 14, 5-o anno

"La enigmo De Beaufront". En: Literatura Foiro, 37-8 (7-o anno)

"Philosophiegeschichtliche Wurzeln und tiefenpsychologische Gründe des Plansprachenstreits 1907-1913". En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft, n-o 4, anno 17.

"Proposte per una collaborazione in campo interlinguistico". En: Strutture ambientali. Centro Manzù, n-o di settembre.

M: Eseo pri Ido. KCE. La Chaux-de-Fonds (Kultura Centro Esperantista).

M: Esperanto aŭ Interlingua?. La Chaux-de-Fonds (Kultura Centro Esperantista).

M: Esperanto et Interlingua. La Chaux-de-Fonds (Kultura Centro Esperantista).

1977

"Bâlaibalan. Mezepoka lingvistiko". En: Literatura Foiro, 43-3 (8-o anno)

"Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI). Dekjara utopio". En: Literatura Foiro, 43-4 (8-o anno)

"Funkcioj en Esperanta Sintakso". En: Monata Cirkulero, n-o 87

"Il retoromancio: presente e futuro". En: La Monda Lingvo-Problemo. 6-o anno, n-o 18.

"Per una prognosi circa la sopravvivenza del dialetto nel Cantone Ticino". En: Language Problems and Language Planning, n-o 2 (anno 1)

"Pri verba riĉeco de Volapük". En: Monata Cirkulero, n-o 90.

A: Esperantal Antologio en Idolinguo. Chiasso (Hans Dubois)
M: Sociopsikologio kaj grupodinamiko de la Esperantomovado. La Chaux-de-Fonds (KCE)

1978

"Kelkaj rimarkoj pri Patro Francesco Soave". En: Monata Cirkulero, n-o 98
"La revuo 'Cosmoglotta'". En: Literatura Foiro. n-o 47, 9-o anno
REC "Noktoj" (Serge Sire). En: Literatura Foiro, anno 9, n-o 47.

1979

"La Langue Bleue". En: Literatura Foiro. n-o 57 (10-anno)
"Loglan (J.C. Brown)". En: Language Problems and Language Planning. n-o 3 (2-o anno)
"Volapükamufalif in Jveiz". En: Literatura Foiro n-o 54 (10-o anno)
A: (kun Günter Lobin, Red.): Einführung in die Interlinguistik. Alstadt (Leuchtturm Verlag).
En ĝi: "Leibniz, Couturat kaj la teorio de Ido", "Prezentado de planlingvoj", "Psikologio kaj planlingvo".

1980

(Trad. de Thomann): "Origino, starigo kaj hodiaŭa stato de Volapük". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 121.
REC "En senvoja sovaĝejo" (Maris). En: Dialogo, anno 7, n-o 25.
"Informi pri la linguo internacia Ido". En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaften (grkg)
"Jakob Sprenger. Forgesita Volapük-pioniro". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 120; aldono aperis en Monata Cirkulero n-o 144, 1982.
REC "Kiel personeco sin strukturis" (Claude Piron). En: Literatura Foiro, anno 11, n-o 61.
"Novlatinoida tendenco 1880-1900". En: Literatura Foiro 60, 11-o anno
"Post Neo, plu nenio". En: Literatura Foiro, anno 11, n-o 61.
"Provo krei modelan ekspozicion". En: Esperanto (UEA), anno 72, n-o 4.
REC "Sociolingvistikaj aspektoj de la Esperanto-Movado". (Detlev Blanke). En: Literatura Foiro, anno 11, n-o 61.
(trad. de C. Goldoni): Le familia del Antiquario. (2-a ed. 1993, en Interlingua kaj Interlingue)

1981

"1981: Jaro de la familio Sforza". En: Lombarda Esperantisto, n-o 4
"Interlingua". En: La Lucerna Progreso, n-o (4)
"La cazzöla". En: Lombarda Esperantisto, n-o 1
"Le Centre de documentation et d'étude sur la Langue internationale". En: Transalpa Esperantisto, n-o 2
"L'Esperantista Lombardo". En: Lombarda Esperantisto, n-o 1
"Plansprachen" (Reinhard Haupenthal). En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 123.
"Tiĉina vino". En: Lombarda Esperantisto, n-o 3
REC "Why Switzerland?" (J. Steinberg). En: Language Problems and Language Planning, anno 5, n-o 3.
A: (kun L. Pascau, Red.): Modern Ido-Poeti. Bellinzona (Hans Dubois)
(Trad. Meisterhans): "Mondlingvaj sistemoj aperigitaj en Svislando". En: Monata Cirkulero (KCE), n-o 122.

1982

"Andreas Juste. La Kalocsay de Ido". En: Planlingvistiko, n-o 1, anno 1

"Auguste Forel, pioniro de Esperanto". In Monata cirkulero, n-o 143
 "Esposizione Edmond Privat". En: Lombarda Esperantisto, n-o 5.
 "Germana influo al la tiĉina dialekto". En: Lombarda Esperantisto, no 7
 "Informazioni". En: Lombarda Esperantisto, n-o 8.
 "La pakto el Torre". En: Lombarda Esperantisto, n-o 6.
 "Nekonata lingva kreado ce Kalocsay". En: Planlingvistiko 2, anno 1
 "Osvaldo Cavandoli. Linio inter Milano kaj la mondo". En: Lombarda Esperantisto n-o 5
 "Pierre Janet. Homo interesata al Esperanto". En: Monata Cirkulero, n-o 144
 "Plej ekvilibra rezulto". En: Literatura Foiro, anno 13, n-o 75.
 "Slipoj de etimologia vortaro de Esperanto". Mokaseno, loĝi, kuiru. En: Planlingvistiko, anno 1, n-o 1.
 "Sociopsicologia del movimento esperantista". En: Parallès no 5, Université de Genève.
 "Vitèl Toné". En: Lombarda Esperantisto, n-o 6.

1983

"Alpa folkloro". En: Lombarda Esperantisto, n-o 8
 "Amarena siropo" (El voster cõgh). En: Lombarda Esperantisto, n-o 13.
 "Ancora sul latino" (Lettera alla redazione). En: Verifiche ACDS, anno 13, n-o 5.
 "Etimologiaj slipoj de Esperanto: kabalo, karesmo, kristano, karnavalo, kvartalo". En: Planlingvistiko, anno 2, n-o 6.
 "Etimologio dil Ido-Vorti". En: Suisa Ido-Buletino, januaro.
 REC "Il castigliano come..." (Valeri Ari). En: Planlingvistiko, n-o 7.
 "Introduzione" a Avventure di un pioniere (di Edmond Privat, trad. Bertolini). Locarno (Pedrazzini); inoltre: "Bibliografia delle principali opere di Edmond Privat".
 "Ĵargonoj en Lombardio". En: Lombarda E-isto anno 7, n-o 14, 15 (1984).
 "Kukurbo-kuketoj (Frittelle di zucca)" El voster cõgh. En: Lombarda Esperantisto, n-o 14.
 "L'Esperanto nella scuola elementare". En: Lombarda Esperantisto, n-o 11.
 "Louis Couturat, pacifisto e patrioto". Suisa Ido-Buletino, januaro
 REC "Miscellanea Interlinguistica" (István Szerdahelyi). En: Language Problems and Language Planning, anno 7, n-o 3.
 "Slipoj de etimologia vortaro de Esperanto. Salajro, blonda, meringo, getto". En: Planlingvistiko, n-o 7.
 "Slipoj de etimologia vortaro. Pekunio, bisextila". En: Planlingvistiko, anno 2, n-8.
 REC "The Esperanto Movement" (p.G. Forster). En: Planlingvistiko, anno 2, n-o 6.
 "Il Dott. Carlevaro parlerà sui cantautori in esperanto". En: Corriere del Ticino, 8.1.83.
 "Informazioni". En: Lombarda Esperantisto, n-o 11.
 "La filatelia e l'esperanto. Conferenza di Kurt Greutert". En: Corriere del Ticino, 9.5.83.

1984

REC "11-a Scienca Interlingvistika Simpozio" (R. Rokicki). En: Planlingvistiko, anno 3, n-o 11.
 REC "Conflict and Consensus in Switzerland" (Carol L. Schmid). En: Language Problems and Language Planning, n-o 8, n-o 2.
 "Dialektoj de franclingva Svislando". En: Transalpa E-isto n-o 13, 14
 "È uscito il periodico Lombarda Esperantisto". En: Corriere del Ticino, 1.12.84.
 "Esperanto". En: Il Dovere 4.12.84.
 REC "Etulaj aventuroj" (Zora Heide). En: Literatura Foiro, n-o 84.
 REC "Lombarda Esperantisto". En: Il Ferroviere n-o 49.
 "Novjara salutmesaĝo". En: Literatura Foiro, n-o 83.
 "Oro, ne nur en Kalifornio". En: Lombarda Esperantisto n-o 16

"Slipoj de etimologia vortaro. Ŝamano". En: Planlingvistiko, anno 3, n-o 11.
